


LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALO 70

Mia fratineto (verkaĵo de 11-jara lernanto).

Mia fratineto estas tri-jara. Ŝi estas tre bela knabino, kaj ni ĉiuj tre amas ŝin! Ŝiaj okuloj estas bluaj, kaj la haroj estas brunaj kaj bukklaj.



Hieraŭ ŝi estis for. La patrino estis en la kuirejo ŝi kuiris la manĝon. Manĝo estis sola en la ĉambro. Ŝi ne ŝatis tion, kaj iris al la strato. La patrino ne aŭdis tion. Estis jam mallume, sed Manĝo ne timis. Feliĉe mi ĵus iris al la hejmo, kaj mi renkontis ŝin en la strato. „Kien vi iras?” mi demandis. „Mi volas serĉi la katon!” ŝi diris, „Ĝi devas ludi kun mi, mi estas tiel sola!” Sed ŝi reiris kun mi al la hejmo. La patrino jam staris antaŭ la domo, por serĉi. Baldaŭ ankaŭ la

patro venis, kaj tiam ni manĝis.

Respondu al la demandoj: Kio estas la nomo de la fratineto? Ĉu ŝi estas bela? Kiaj estas la haroj? Ĉu la okuloj estas verdaj? Ĉu ni amas la fratineton? Kiom da jaroj ŝi havas? Kie ŝi estis hieraŭ? Kial ŝi iris el la domo? Kie estis la patrino? Kion faris la patrino? Ĉu la fratineto reiris al la hejmo? Ĉu la patrino jam serĉis? Kiu ankaŭ venis al la hejmo? Kion ni tiam faris?

Enigmoj (la solvojn vi trovos aliloke).

Per kiu reto oni ne kaptas fiŝojn?

Kiun ulon neniu ŝatas?

Kiu valo ne kuŝas inter montoj?

La kotono.

Lano kreskas sur la dorsoj de ŝafoj. Tion vi bone scias. Sed kie oni trovas la kotonon, vi pensas? Kotonon kreskas sur arbetoj. La kotonarbo estas unu aŭ du metrojn alta. Ĝi portas grandajn, flavajn florojn. Kiam la floro falis, restas ŝelo, ovogranda. Kaj ĉi tiu ŝelo enhavas specon da silka lanugo, blanka aŭ flaveca. Oni ŝpinas ĉi tiun lanugon kaj faras el ĝi katunojn, ĉu por ĉemizoj, jakoj, aŭ aliaj vestoj.

Anagramoj.

Kiam oni ŝanĝ-aranĝas la literojn de vorto, tiel ke oni formas alian vorton, oni faras anagramon. Anagramoj estas ekzemple: roko kaj koro, ondi kaj doni, libro kaj brilo, nomo kaj mono.

En ĉiu ĉisuba frazo estas anagramo. Serĉu ilin:

Kun miro la poeto aŭskultis al la belega rimo de sia propra poemo.

Tiu ĉi belega bramo havas la koloron de ambro.

La tuta kaso sin trovas en tiu malgranda sako.


La nigraj negroj promenas inter la flavaj grenoj.

La libro kuŝis en la brilo de la lampo.

La luno kaj la nulo similas unu la alian kiel du akvogutoj, ambaŭ estas rondaj.

Jen kelkaj anagramoj! Estas beleta ludo serĉi anagramojn! Ĉu vi sendos ilin eventuale al mi?

Rogiero.



Kiu povas fari verkaĵon ĉe la supraj bildoj? Bone rigardu la bildojn, kaj tiam rakontu pri ili. Sendu vian verkaĵon al TJO-Centro, West-Graafddijk, Nederlando, antaŭ 1 februaro. Por la plej bona verkaĵo ni donos premion! (La bildoj estas kopiitaj el la hungara infangazeto „Pájtás”).

Tri, kiuj mortis.

Foje diris Muŝo al siaj tri idoj: „Atentu, filoj miaj, la mielon, la vinon kaj la kandelon. Kiu alproksimiĝos al ili, tiu nepre mortos!”

La unua muŝido diris: „Atenti la mielon ... Frenezajo! Abelo produktas mielon kaj daŭras vivi. Homo manĝas mielon kaj daŭras vivi. Ankaŭ urso ŝtelas mielon, manĝas ĝin kaj ne malsaniĝas. Kial do mortus mi, se mi manĝus mielon?”

Ĝi foriris kaj manĝis mielon ĝissate. Ĝi deziris ekflugi: ĝi ne povis ekmovi sin de sia loko. Ĝia animo, ho ve, eliĝis, dum ĝi restis algluiĝinta sur la mielo!

La dua muŝido pensis: „Atenti la vinon ... stultaĵo! Bela estas vino; bongusta estas vino. Ĉiuj trinkas vinon kaj diras „Je via sano!” Kial do mortus mi, se mi trinkus vinon?”

Ĝi foriris por trinki vinon: En la glason ĝi ja falis. Ĝia animo, ho ve, eliĝis, dum ĝi profundigis en la vinon!

La tria muŝido diris: „Miaj du fratoj mortis, ĉar ili ne priatentis siajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Sed kandelo ja estas nek manĝaĵo, nek trinkaĵo. Kia danĝero estus en la kandelo? Vantaĵo de vantaĵoj!”

Ce la flamo ĝi provis varmiĝi. Fajro ĝin ekkaptis. Ĝia animo, ho ve, brulkonsume eliĝis!

„Aŭskultu, mia filo, la instruon de via patro.”

El la hebrea lingvo esperantigis Ben Sion Ohana, Instruisto en Marrakech, Maroko.

Duobla ŝerco.

Tri usonaj oficiroj dungis ĉinan serviston kaj volis provi, ĉu li komprenas ŝercon. Vespere ili fiksis per najloj la ŝuojn de Ming al la planko. Ming venis la sekvantan matenon en la ĉambron de la oficiroj. Afable ridetante li prezentis al ili tason da teo.

Nenia rezulto, la oficiroj pensis. Vespere ili ŝutis amason da sablo en la liton de Ming, kiu tamen senŝange gaje ridetis, kiam li la sekvantan matenon alportis la teon al la oficiroj.

„Ming,” diris oficiro, „vi estas bravulo. Dufoje ni provis vin. Ni ne plu faros tion.”

„Ĉu la sinjoraj moŝtoj ne plu fiksos miajn ŝuojn al la planko?” ridetante demandis Ming.

„Certe ne, Ming.” la oficiroj diris.

„Kaj ĉu vi ne plu ŝutos sablon en mian liton?”

„Certege ne, Ming.”

„Vastega estas mia ĝojo,” kun ĉiela rideto diris Ming. „Kaj tiam Ming ne plu kraĉos en la teon de la sinjoraj moŝtoj.”

Respondu al la demandoj: Kiuj dungis ĉinan serviston? Kion ili volis provi? Kion ili faris? Kiu iris en la mateno al la ĉambro de la oficiroj? Kion li alportis? Ĉu Ming aspektis kolere? Kion pensis la oficiroj? Kion ili faris en la vespero? Ĉu Ming estis kolera? Kion diris la oficiro? Ĉu Ming ĝojis? Kion li diris?

La barbisto de lia imperiestra Moŝto Jozefo la Dua.

La imperiestro Jozefo II-a iam alvenis en francan urbon antaŭ sia sekvantaro. Gastejstrino demandis al li, ĉu li apartenas al la servistaro de l' imperiestro.

„Ne,” respondis la princo.

Kelkajn minutojn poste ŝi eniris ties ĉambron, dum li estis razanta sin. Ŝi demandis al li: „Ĉu vi tamen ne havas iun ajn oficon ĉe la imperiestro?”

„Ho jes,” diris la monarĥo, „mi razas lin de tempo al tempo.”

Tasko por komencantoj: Kopiu kaj traduku la anekdotojn ktp. de ĉi tiu rubriko.

Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Tri, kiuj mortis” kaj de „La barbisto de lia imperiestra moŝto Jozefo la Dua”.

Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: 1. Vintro-sporto. — 2. Nia hundo. — 3. Nia ĝardeno (sendu la verkaĵojn al TJO-Centro, W. Graafdiijk, Nederlando. La plej bonajn ni enpresigos en LJV).

Malnova!

Jam dum longa tempo la farmisto staris kaj rigardis al aŭtomobilisto, kiu vane klopodis ree funkciigi sian kadukan veturilon. Tio tre incitis la malfeliĉan ŝoforon, kaj kolere li kriis: „Kial do vi tiel gapas! Ĉu tio estas la unua aŭtomobilo, kiun vi vidis en via vivo?”

„Ne,” estis la seka respondo, „sed ĝi similas al tiu!”

Kio estas ĥamsino?

Ĥamsino estas iu ina animalo, ĉu ne? — Kompreneble! — Ĉu ŝi estas forta rabobesto, aŭ ĉu nur malgranda besto, eble speco de formiko? Ĉu ŝi vivas inter montoj, en la arbaro, en la profundaj

maroj, aŭ en la polusaj regionoj, aŭ en la dezerto? — Jes, en la dezerto, sed ... ĥamsino ne estas animalo, tute ne, nek ina, nek vira! Ĝi estas la arda sablo-ventego en la dezerto.

Rogiero.

Kiel ni pavimis la trotuaron.

En nia urbo oni pavimis la urbo-placon, kaj oni volis fini la laboron antaŭ la ŝtata festo-tago: la 28-a de oktobro. Do oni eĉ laboris en la vespero, kaj multaj laborbrigadoj helpis. En nia strato estis difektitaj eble du metroj da trotuaro. Ĉar la ŝtonkubetoj kaj sablo kuŝis pretaj, ni, kelkaj buboj, eklaboris, kaj en 2 tagoj ni pavimis ĝin. Ni tre ĝojis, ke ankaŭ la urba arĥitekto laŭdis nin.

Radvan Bartovsky (12-j.), Upice, Ĉeĥoslovakujo.

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN VERSAILLES (27/7-3/8)

En interkonsento kun la franca ĉefperanto la organizantoj provizore fiksas la daton pli frue, ol ni antaŭe anoncis. Ĉi tiu tempo certe estas pli favora, ĉar diversaj grupestroj deziras partopreni la UEA-Kongreson en Bournemouth. Nun tio eblos.

Cetere ni ankoraŭ ne ricevis multajn detalojn. S-ro Chilard klopodas akiri lernejon kiel loĝejon. Versajne ni povos tagmanĝi en kooperativa restoracio. Bedaŭrinde oni ankoraŭ ne informis pri la kostoj.

La solvoj de la enigmoj: Portreto — Makulo — Karnavalo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretario A. Schouten, 122, Oosthuizen, Ned.).

Brazilo: Bonvolu atenti, ke la ĉefperanto havas novan poŝtkeston: lia adreso nun estas: S-ro Luiz Bartolomeu, Caixa Postal N 232, est. S. Paulo, Bauru.

TJO-Bultenoj. En Danujo aperis No. 2; en Nederlando aperis la 13-a No.; ankaŭ en Svedujo jam aperis kelkaj numeroj; Nun la itala sekcio eldonis la unuan bultenon, „La Feo”.

Tiaj eldonoj estas tre utilaj, ĉar ili povas enhavi specialajn landajn informojn, kaj estas ligilo inter la anoj. Ni forte konsilas al ĉiuj ĉefperantoj pripensi la eldonon de tia landa bulteno, kaj interŝanĝi ilin. Ĉiuj anoj kunlaboru tiucele!

Alvoko: La nederlanda sekcio starigis ekspozician servon por helpi la lokajn junulajn grupojn en la propagando. Tamen — por bone aranĝi tion



la subskribinto bezonas vian helpon! Vi do sendu ĉian materialon: gazetojn, broŝurojn, librojn, kartojn, kovertojn kun Esperanto-signoj, glumarkojn, afiŝojn, ktp. al:

A. de Smit, Karnemelksloot 19, Gouda, Nederlando.



DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

Jam de kelka tempo vi ne vidis ĉi tiun rubrikon en LJV.

„Kial ne? Ĉu la movado ne plu ekzistas?” Tiel jam kelkaj informiĝis. Ho jes, geamikoj, ne timu, ke la bela laboro de pranonklo Roberto perdiĝis. Sed se ne aperas informoj pri D.E. en LJV, tio signifas, ke ni ne ricevas da ili.

Ĝenerale la geonkloj de D.E. estas tre silentemaj, jes — eĉ inertaj! De ĉi tie ni volas instigi ilin al pli da aktiveco! Kaj ne nur la geonklojn, sed ĉiujn gepatrojn-esperantistojn!

Aligu viajn infanojn al D.E., tiel zorgante, ke ili jam de la naskiĝo apartenu al la Granda, Tutmonda Familio. Okaze de la naskiĝtago ĉiuj infanoj ricevas belan gratulkarton de onklino Filis, el Anglujo. Post la sesa jaro ili ricevas la ok-paĝan eldonon „La Juna Vivo”. La kotizoj estas malaltaj: ĝis la 6-a jaro nur 0,50 guld. jare (1 ŝ; 50 fr.fr.; 0,20 dol). Post la 6-a jaro la kotizo estas 1 guld. jare (2 ŝ, 100 frfr.; 0,40 dol).

Por multaj anetoj en januaro ree devos esti pagata la kotizo por la nova jaro. Ĉu ni tiucele ankoraŭfoje rajtas atentigi vin pri la listo de perantoj en la antaŭa No.? Ĉi tiu numero estas sendata al ĉiuj anoj, do ankaŭ al tiuj, kiuj estas malpli aĝaj ol 6-jaraj.

Plue onklino Filis havas peton al vi: Ĉu vi scias, ke D.E. havas belegan foto-albumon, en kiu estas la bildoj de tre multaj anoj el la tuta mondo? Sed — ankoraŭ mankas bildoj, precipe de la novaj anetoj. Ĉu vi ĉiuj volas helpi kompletigi ĝin? Se vi ankoraŭ ne sendis fotografaĵon, faru tion baldaŭ! Adreso: S-ino G. P. Weston, 27 Cecil Rd., London N. 10, Britujo.

Se vi havas interesajn informojn pri D.E. sendu tiujn al la red. de LJV, TJO-Centro, West-Graafdiijk, por ke ni pli regule povu aperigi ĉi tiun rubrikon!

Novaj anoj (kun naskiĝdatoj): Jean-René Gaillard, Chateau-Larcher (Vienne), Francujo (4-11-'46); Manuel Antonio Bartolomeu, Caixa Postal 232, Bauru, Est. Sao Paulo, Brazilo (17-8-'46); Luiz Gabriel Bartolomeu sama adreso (24-12-'45); Silvia Maria Graciano (9-6-'43); Brigitta Pöhler, 2, Potsdam, Heimrode 6 (Gartenhaus); Ingrid kaj Karin Conrad Rettcke, Potsdam, Hegemeisterweg 2, Germanujo (de la lastaj mankas la naskiĝdatoj); Robin Beecher, 71 Warwick Rd., Thornton Heath, Surry, Britujo

(18-6-'35); Konstantina (4-jara) kaj Esperantina (4-monata) Konstantinova, B. N. Banka No. 4, str. Lege 2, Sofio, Bulgarujo; Alain Verdier, 78 Av. Marie-José, Bruselo, Belgujo (17-2-'47).



SKOLTA RUBRIKO.

Grafo Bernadotte.

La tutmonda skoltaro funebrás, ĉar unu el ĝiaj plej sindonemaj estroj mortis.

Grafo Bernadotte naskiĝis en la jaro 1895-a.

Dum la milito li fariĝis prezidanto de la sveda Ruĝa Kruco, kaj li multe klopodis plibonigi la vivon de la militkaptitoj el ĉiuj landoj.

Ĉar li amis la junularon, li plenumis la devojn de ĉefkomisaro de la svedaj skoltoj.

Grafo Bernadotte estis mortigata en Palestino, dum li klopodis ĉesigi la militon. Li montriĝis apostolo de la paco.

Zigzaganta hipopotamo.

Britujo: Se estos sufiĉe da intereso okazos skolta tendaro ĉe Bournemouth, dum la UEA-Kongreso (6—13 aŭg.). Ĉiuj skoltoj, kiuj estas anoj de iu landa skolta grupo (do ankaŭ neSEL-anoj) povos partopreni.

Por informoj oni turnu sin al s-ro L. Symes, Quains, Minclinchampton, Glos., Anglujo.

Brazilo: „Ĉu vi iam aŭdis pri la „Insulo de la skoltoj“? Ĝi ne estas fabela insulo, ĝi vere ekzistas. La insulo troviĝas oriente de Rio de Janeiro, apud la haveno Nictheroy. Neniu rajtas eniri tiun insulon, krom la skoltoj. Por atingi la supron de la insulo oni devas suriri ŝtuparon, kiu nomiĝas „la vojo al skoltismo“. Sur la supro staras bela kapeleto, kaj apud ĝi troviĝas la ĉefkvartalo de la geskoltoj. La ĉefkvartalo enhavas belan muzeon pri skoltismo.

La lastan aŭtunon la brazilaj geskoltoj akceptis kolonelon Wilson, la ĉefkomisaron de la internacia skolta oficejo, sur la „Insulo de la geskoltoj“.

La skoltaro estas vere internacia frataro, kaj ni sincere esperas, ke Esperanto baldaŭ fariĝos la interligilo de la geskoltoj!

Ĉeĥoslovakujo: La ĉeĥa skolta movado aliĝis al la tutŝtata junularmovado. Laŭleĝe la geknaboj rajtas skoltumi ĝis ili estas 15-jaraj. La pli aĝaj junuloj rajtas esti skoltestroj, ĝis ili estas 28-jaraj. Ili samtempe estas membroj de la „Asocio de la ĉeĥa junularo“.

Zigzaganta hipopotamo.

KORESPONDADRESOJ

Ciu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belujo: 20 gekursanoj, 18—45-j., dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Resp. certa. R. Lambert, Esp., profesoro, 49 rue Ern. Allard, Bruselo.

Bulgarujo: La centra estraro de Junulara Fako ĉe Bulg. Esp.-Asocio, str. „Tri Uŝik”, Sofio, petas ĉiujn progresemajn gesamideojn sendi al ĝi materialon kun junulara enhavo. La materialoj estos publikigataj en Int. Kulturo, kiu enhavos kolonon „Junulara Vivo”, aŭ en iu bulgara gazeto. La sendinto ricevos ekzempleron de la gazeto, en kiu lia materialo aperis.

Junulara Rondo „Juna Esperantisto” en Assenovgrad (30 gekursanoj, 14—19-j.) dez. kor. k.ĉ.l. Resp. certa. Skribu al k-do Lozanov Georgi, str.: „Kapitan Andreev” No. 14, Assenovgrad.

Hristo Marinov, str. „Angel Kânĉev 13, Razgrad, gimnazia instruisto, dez. kor. k. la tuta mondo, recipe pri geografio kaj ekonomio. Resp. certa.

Ĉeĥoslovakujo: Milán Snédar, Ostrava 6, Mariánská 11 (20-j. skolto) dez. kor. kaj interŝanĝi skoltaĵojn.

50 studentinoj (15—18-j.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Skribu al Lida Holoubková, faka instruistino, Olomouc, Lidická 4.

Germanujo: Mi havas kelkcentojn da germanaj poŝtmarkoj, kiuj valoris antaŭ la milito. Se vi havas intereson pri ili, skribu al H. Togeretz, Düsseldorf-Rath, Kreuzweg 6.

Jugoslavujo: S-ro Marinko Ĝivoje, Zagreb I, Vodnikova 19/II, bez. 24/36 mm filmojn kaj magnezisaketojn. Rek. per esperantaĵoj, gazetoj, ktp.

Nevidkapablaj geesperantistoj, loĝantaj en Blindula domo, dez. kor. brajle kun blinduloj tutmondaj. Dom slijepih, esp. grupo, Zagreb, Radnicka cesta 12.

Nevidkapabla profesoro dez. kor. pri lingvistiko per brajla kaj maŝina skriboj. Adr: Karlo Muhar, Zagreb, Visegradska 11.

Nederlando: Kiu eksterlanda knabo, pr. 9-jara, dum ferio deziras gastloĝi ĉe Eric de Visser? Unue li loĝu ĉe Eric, kaj poste Eric loĝu ĉe li en la eksterlando. Ĉefkondiĉo estas, ke ili interkompreniĝu per Esperanto. Adreso: A. de Visser, Oudehovenstr. 6, Dordrecht.

Norvegujo: (korekto) 7-jara knabino, Birgita Anjer, Oberst Rodesveg 76, Nordstrandhøgda, dez. interŝ. bildk., salutojn, kun samaĝaj infanoj.

Polujo: Por miaj gelernantoj kaj gestudentoj mi bezonas adresojn de korespondemuloj el div. landoj. Skribu al Prof. Mieczyslaw Sygnarski, lektoro de Esperanto en Jag. Univ. Krakovo, Sloneczna 4 m 23.

Danujo: Bonvolu saluti LETERVESPERON okazigota de Holbaek Esp. Klubo, Ringstedvej 17, Holbaek, meze de februaro.

Germanujo: S-ro Horst Klafike (19-j.), (21b) Dortmund, Reichswerstr. 19, dez. kor. kun ferajistoj aŭ teknikistoj de feruziloj.

„Paco kaj Justeco”, sekcio Bruĝo de la Flandra Ligo Esperantista, ŝatus ricevi por sia verda kabaredo „La Bruĝaj Piratoj” tekstojn de mallongaj, sed spritaj teatraĵetoj. Kiu disponigos taŭgajn programpunktojn por varieca vespero? Ni pretas pagi honorariojn. Sendu ĉion al „Paco kaj Justeco”, Nieuwstraat 54, Assebroek bij Brugge, Belgio.